

ELDONANTOJ:
D-ro L. Zamenhof, Warszawa (Varsovio)
W. M. Page, adv., Edinburgh
Ernest Archdeacon, Paris
J. Gili Norte, Barcelona
Teo Jung, Köln (Kolonjo)
Frans Schoofs, Antwerpen
P. v. Medem, bankdirektoro, Kaunas (Kovno)

REDAKTOROJ:
Ĉef-redaktoro: Teo Jung
Kun-redaktoro: M. Butin
Literatura red.: Zanon.

ADMINISTREJO:
Horrem bei Köln, Germ.
Postĉekkonto Köln 7063, por Teo Jung, Horrem.

ANONCOJ
po cm² 0.10 svisa franko (aŭ ĉe antaŭpago 18 gmk.)
Rabato laŭ interkonsento.

ESPERANTO

100 TRIUMFANTA SEMAJNA 100

Internacia Neŭtrala

Nur de Vi dependas en ET daŭre estos ses-paĝa!

Abonon ĉiu pagas laŭ la taga kurzo de sia propra valuto, se eble per ŝtataj monbiletoj en rekomendita letero, eventuale per ĉeko sur germ. banko, sed ne per poŝtmandato. Abonantoj, kies abono estas finiĝonta, ricevas ĝustatempe admonilon. Abonoj povas esti komencataj per iu ajn numero.

Por Abono oni sendu laŭvole alian sumon, kaj ni liveros tiom da numeroj, por kiom valoras la pago. — Prezo de unu numero: 0.06 dolaro, 0.15 guld., 0.24 sved. kr., 0.50 svis. fr., 0.50 dana aŭ norvega kr., 0.50 peseto, 5/8 pencoj, 0.50 it. aŭ belg. fr., 0.70 lirj., 1.20 mk., 1.40 ĉ. kr., 15 germ. mk., por germanoj kaj baltoj, 8 germ. mk. por rusoj, 15 hung. kr., 80 pol. mk., 400 aŭstr. kr.; al valutoj pagas samvaloron de 0.50 franc. fr. aŭ unu stamp. — resp.-kup. Por Adressaĝoj ni kalkulas la prezon de 2 n-oj.

Liston de niaj Abonejoj vidu sur paĝo 51 — Germanoj abonu je favorprezo ĉe sia poŝtoŭficejo. Balkananoj demandu abonprezon ĉe la Abonejoj. Dumviva Abono kostas la prezon de 400 numeroj. Abono al la Literatura Aldono (aperanta ne-regule) estas nedeviga. Du Literaturaj Aldonoj — kostas la prezon de unu numero de ET.

Numero 100 :-: Antwerpen, Barcelona, Edinburg, Kaunas Köln, Paris, Warszawa :-: 3. Septembro 1922.



A tuta sekreto de ĉiu sukceso konsistas nur en tio, ke ni turnu nin al la ĝusta direkto kaj simple iru antaŭen, ke ni ne lasu nin devojigi kaj ne perdu la kuraĝon, eĉ se ni estus repuŝataj kelkfoje aŭ ofte.

Ralph Wando Trine
 („Pri la plej valora gajno“).

NIA CENTA.

Nia Centa! Jen ĝi estas! Speciale bela ĝia kostumo, speciale granda ĝia amplekso! Fiere ĝi portas en ĉiujn partojn de la mondo sur sia titolo la vorton „Esperanto“ kaj la radiantan verdan stelon, — simbolo de la nelacigeble de la paca batalantaro por alta ideo; antaŭsigno de nia baldaŭa fintriumfo.

Kiam vi, karaj legantoj, hodiaŭ akceptas kvazaŭ ion memkompreneblan la 100-an numeron de ET, bonvolu tomete pripensi ankaŭ la malfacilaĵojn, kiujn ni devis venki antaŭ ol atingi la nunan belan sukceson.

Antaŭ iom pli ol du jaroj, kiam la fondinto de ET, s-o Teo Jung — certe kun granda fido kaj kuraĝo, tamen kun ne malpli granda zorgo — dissendis siajn unuajn prospektetojn pri la „estonte ĉiutaga ĵurnalo Esperantista“, li estis ankoraŭ granda nespartulo en la sfero de eldono de Esperantaj. Tiom da klopodoj kaj penoj, tiom da laboro, kiom poste de li kaj de liaj kunlaborantoj postulis la eldonado de ET, il ne antaŭvidis, eĉ ne supozis. Krom tio, la monda situacio estis tre malklara kaj restis tia ĝis la hodiaŭa tago. Tamen la bona idealismo, la firma volo, la celkonscio, la laborvenkemo, kelkaj „genietaj“ pensoj, la subteno flanke de bonvolaj gesamideanoj, la kelkfoje por ni favoraj cirkonstancoj, je kiuj ni sciis profiti ĝustatempe kaj en ĝusta maniero, kaj ne laste la konfido kaj fideleco de niaj abonant-amikoj, — ĉio kune certigis la sukceson. Nek monaj malfacilaĵoj (precipe en la unua tempo), nek teknikaj malhelpoj, nek striko, nek ŝtelo, nek malsano, nek kongresa aŭ feria tempo povis haltigi ĝis nun la regulan ĉiusemajnan elradon de ET kaj espereble neniam haltigos ĝin.

Kaj jen ni prezentas al niaj legantoj nian centan numeron. Ke ĉiuj ĉerpu el la sukceso de nia ĵurnalo novan kuraĝon kaj esperon por la triumfo de nia alta ideo!

Kuraĝe antaŭen al la Ducenta!

Statistiko.

La abonantaro de ET estas nuntempe (laŭ statistiko farita la 25. aŭgusto) en la landoj: Germana 166 kaj (germana poŝto) 413, Pola 238, Holando

203, Ĉeĥoslovaka 197, Aŭstra 158, Belga 141, Finna 137, Svisa 136, Rumana 127, Franca 119, Estona kaj Rusa po 113, Angla 111, Hungara 101, Itala 84, Bulgara kaj Sveda po 78, Jugoslava 67, Siberio 50, Latva 44, Japana 38, Usono 33, Litova 29, Dana 23, Argentina 19, Danzig 17, Brazila 9, Norvega 7, Kanada kaj Ukraina po 5, Aŭstralio kaj Islando po 4, Brita Okc. Hind., Fiume kaj Irlando po 2, Brita Kol., Egipta, Georgia, Kolumba, Maroka, Meksika, Nederl. Hinda, Palestina, Panama,

Dumvivaj abonantoj,

kiuj jam pagis la kotizon:

1. D-ro Maximilian Blassberg, Kraków, Polujo.
2. Andreas Seidenberg, Köln, Germanlando.
3. F. P. Rehor, Immensee, Svistando; nuntempe en Wien, Aŭstrio.
4. Jules Thiébault, Carignan, Francujo.
5. J. R. G. Isbrücker, 's-Gravenhage, Nederlando.
6. D-ro Augustyn Stéfán, Kraków, Polujo.
7. Anton Valenti, Wien, Aŭst.
8. Henk Goemans, Konstantinopolo.

Komprenble la presejo — malgraŭ sia pligrandiĝo — ankoraŭ estas malgranda; tamen la progreso jam estas konsiderinda, kaj ni esperas, ke ankaŭ en estonteco ni povos konstante pligrandigi ĝin.

Ni rimarkigu ankoraŭ, ke la presejo ne presas nur Esperantajn sed ankaŭ germanlingvan gazeton kaj german- kaj franc-lingvajn presajojn.

Juĝoj — elekto el centoj.

Pri ET kaj ĝia enhavo.

... Kiel mi povis konvinkiĝi, ET ĝis nun staris sur senpartia bazo...

... Subteni vin estas devo de ĉiu Esperantisto, al kiu estas kara nia ideo, des pli, ke vi kun via valuto estas pli akirebla ol iu ajn alia organo.

... mi profitas la okazon salui vin kaj deziri al vi sukceson.

D-ro L. Zamenhof.

... Ĉar via gazeto estas kun la plej novaj informoj kiel semajna gazeto ankaŭ la plej interesa.

Zagreb, 16. 6. 22.

D-ro Maruzzi.

Via gazeto ĉiusemajne treege ĝojigas min. Ĝi estas nepre necesa en nia movado kaj ofte utilis al mi.

Udenhout, 26. 9. 21. D-ro Smulders, ĉefredaktoro de „Espero Katolika“.

ET ĉiam donis al mi la plej grandan ĝojon el ĉiuj Esperantaj.

Immensee (Svisl.), 5. 7. 22.

F. P. Rehor.

Sen ET, mi opinias, mi ne povas nun vivi kiel Esperantano.

Philadelphia, 13. 1. 22.

K. Vidikauskas.

Mi estas kontentega pri la regula aperado de ET kaj ankaŭ pri ĝia enhavo; mi ĝin legas plezure de la titoloj literaj ĝis la lastaj kaj min sentas fiera pro ĝia interesa enhavo.

Jaén, 24. 7. 22. J. Anguita Galán.

Mi restas ĉiam fidele al nia ET.

Sered (Ĉsl.), 12. 7. 22.

J. Kratochvilla.

Pri sukceso de artikolo en ET.

Venis al mi jam kelkaj demandoj sekve de la artikolo de samideanoj, kiuj intencas aŭ pasigi sian libertempon aŭ uzi la kuracilon ĉe ni. Mi esperas sekve de la artikolo nunjare multenombrian vizitadon flanke de la Esp. bangastoj.

Reichenhall, 25. 6. 22.

Fr. Mayerhauser.



Zanonl. Teo Jung. Max Butin.

La Redaktoraro de ET.

Transvala, Turka kaj Venezuela po 1. Enlute ĉ. 3200, el kiuj ĉ. 2900 estas pagataj.

La germanaj poŝtabonoj okazis ĉe 237 poŝtoŭficejoj en 185 diversaj urboj kaj vilaĝoj. Unuan lokon okupas Berlin kun 14 oficejoj kaj 19 abonoj, duan Plauen kun unu oficejo kaj 16 abonoj, trian Leipzig kun 8 oficejoj kaj 15 abonoj.

Interesa estas komparo kun la statistiko de 21. majo (publikigita en n-o 86). Laŭ ĝi oni konstatas kreskon de la abonantoj en la landoj Aŭstra, Belga, Bulgara, Estona, Finna, Franca, Holando, Hungara, Itala, Jugoslava, Latva kaj Rusa. Speciale rimarkebla la kresko estas en Holando, Jugoslavio kaj Ruslando. Malkreskon oni konstatas precipe en Germanujo (kaŭzo estas la ĉesigo de la poekzemplera vendado en lokoj, kie la gazetvendistoj estis tro nezorgemaj aŭ tro prokrastemaj ĉe pago, plie la kreskanta mizeriĝo de la lando kaj malkreskanta aĉetkapablo de l' germana popolo), krome en Ĉeĥoslovakio (ĉefa kaŭzo la ĉesigo de la poekzemplera vendado en Praha, pro nepago de la revendinta samideano), Litovio kaj iom en Polujo. Entute la komparo montras proksimume la saman nombron de abonantoj; sed la kvalito de la nunaj abonantoj estas ĝenerale supera rilate fidelecon kaj valuton. Krome estas konsiderinde, ke en somero la plimultaj gazetoj kutimas perdi iom da siaj abonantoj. Do ni rajtas esperi, ke la venonta vintro alportos al ni minimume 500 pliajn abonantojn.

9. F-ino Nella Boon, 's-Gravenhage, Nederlando.
10. Talivaldo Indra, Riga, Latvio.
11. F-ino Marie Paita, Unhošt, Ĉeĥoslovakio.
12. Curt Stoekert, Dresden, Germanlando.
13. Prof. G. Roy, Gallac, Francujo.
14. K. Köhler, Essen, Germanlando.
15. Ferd Hebing, Köln-Klettenberg, Germanlando.
16. Axel Baesens, Mechelen-Malines, Belgujo.
17. Coté, Utrecht, Nederlando.
18. J. Grünthal, Haapsalu, Estonio.
19. A. Grünthal, Haapsalu, Est.

Ancenis sin ankoraŭ allal samideanoj el Hispanujo, Britujo kaj Germanlando, sed ili ankoraŭ ne pagis la kotizon aŭ nur parton de ĝi.

* * *

La okupitaro de la firmo Jung.

Krom fratoj Teo kaj Heinz Jung estas okupataj en la firmo: en julio 1920 du personoj (unu kompostisto kaj unu lernanto); en januaro 1921 kvar personoj; en oktobro 1921 sep personoj; kaj en septembro 1922 dekdu personoj, inter ili kvin Esperantistoj (unu eksterlandano).

* * *

Maŝinaro.

Ĝis junio 1921 la presejo posedis nur unu mane funkciigeblan presmaŝinon kaj unu piede funkciigeblan presmaŝineton. En junio 1921 la mane funkciigebla maŝino estis anstataŭata per motore funkciigebla maŝino. Nuntempe troviĝas en la presejo du motore kaj unu piede funkciigataj presmaŝinoj kaj kelkaj helpmaŝinoj.

La nombro de la kompost-stabloj altiĝis de tri (en 1921) al dekdu (sept. 1922).

Pri sukceso de anoncoj en ET.

... ni ne volas preterlasi esprimi al vi ĉi tiu loko nian dankon pro via valora helpo. Ankaŭ en estonteco ni volonte uzos vian legindan ĵurnalon por porti la de ni aranĝitan Esperanto-mond-reklaman en vastajn Esp. rondojn de l' en- kaj eksterlando...
Foironicejo Frankfurt a. M.

Ni estas ĝojaj povi deklari al vi, ke la rezultato de nia anoncado en via gazeto ĉiam pligrandiĝas. Kvankam ne jam profitinda, ni kredas, ke la anoncado en ET komencas sin pagli. Ni estas tre kontentaj povi diri tion jam nun al vi.
Nederlanda Esp. Komercicejo Rotterdam.

La sukceso de niaj anoncoj en via gazeto estis tiel bona, ke ni estas vere mirigitaj pri ĝi. Ni jam ofte anoncis en grandaj fakaj gazetoj sed malofte kun la sama bona rezultato.

Ni komunikas tion al vi, ĉar ni volas montri al vi nian dankon, kaj ke vi utiligu tiun ĉi ateston por via gazeto.
Muscat & Christlein, Nürnberg.

... mi krom tio dankas vin por enpresigo de mia anonceto, kiu ebligis al mi trovi ĝis nun 4 samideanojn, kiuj fariĝis miaj korespondantoj pri fotografarto.
O. E. en B.-Fr.

Per anonco en ET mi ricevis ĉirkaŭ 30 leterojn aŭ poŝtkartojn — do signo de granda disvastiĝo. ET certe triumfos.
A Proshka, Kaaden, Ĉsl.

Nia Literatura Aldono.

Al la hodiaŭa numero estas aldonita la unua folio de la jam delonge projektita „Literatura Aldono“. Ni komencas per la publikigo de interesa „Taglibro de Vilagpedelo“ de la fama dana verkisto Blicher, tradukita de s-ano H. J. Bulthuis, Lingva Komitato, kaj rekomendita de Esp. Lit. Asocio. La taglibro ampleksas antaŭvideble 48—64 paĝojn, t. e. 3—4 foliojn de la Lit. Aldono. Poste ni publikigos en la Lit. Aldono pli-malpli ampleksajn rakontojn, teatraĵojn, poemojn kaj allapecajn literaturaĵojn.

Ĉar ni ankoraŭ ne povas antaŭvidi la nombron de la abonantoj al Lit. Aldono nek la teknikajn eblojn de nia presejo, la Lit. Ald. aperos komence neregule, sed — laŭeble — ĉiun duan semajnon en amplekso de po 16 paĝoj. Se la abonantaro al Lit. Ald. kreskos sufiĉe rapide, ni baldaŭ eldonos ĝin ĉiusemajne.

La prezo por du 16-paĝaj Lit. Ald. estas la sama kiel por unu numero de ET.

La Lit. Ald. estas abonebla nur por abonantoj de ET. Ili simple sciigu nin, ĉu ili deziras aboni ankaŭ la Lit. Ald., kaj ni prenos la prezon por la Lit. Ald. de ilia abonkonto por ET.

Germanaj poŝtabonantoj povas aboni la Lit. Ald., sendante al ni la poŝtkvitancon kaj pagante samtempe iun laŭvolan sumon al nia poŝtĉeka konto. La nuntempa prezo de unu Lit. Ald. por ili estas 7.50 mk.

Revendistoj de ET povas ricevi tiom da Lit. Ald., kiom da ET ili ricevas; sed ili devas mendi la Lit. Ald. firme, t. e. ili ne rajtas resendi la nevenditajn ekzemplerojn de Lit. Ald.

Por plisimpligi nian librotendon, ni de nun ne plu akceptos abononjn po jaro, duonjaro aŭ kvaronjaro, sed nur laŭ numeroj. Oni sendu laŭvole alian sumon, kaj ni liveros tiom da numeroj por kiom la sumo valoras (vidu la prezon de unu numero sur la titolpaĝo), kalkulante por abonantoj de Lit. Ald. unu ET-numeron po du Lit. Ald.

Prezo de ET.

Pro la nekonstanteco de la germana valuto ni de nun fikso la prezon por ĉiuj landoj (escepte Ruslando) laŭ ilia propra valuto, por ne devi ĉiun duan semajnon alligi la prezojn. La prezojn por baltaj kaj oalkanaj landoj ni ankoraŭ ne povis fiksi, ĉar la intertraktoj kun iliaj abonejoj ankoraŭ ne finiĝis.

La Opan Vendadon ni ĉesigos en Germanlando komence de oktobro, ĉar ni hezitas postuli — ĉe la nuna situacio — de niaj germanaj amikoj tiun prezon por unuopa numero, kiun ni devas postuli laŭ la cirkonstancoj; al ili ni konsilas aboni ĉe sia poŝtoŭicejo, ĉar — pro la regularo de la poŝto — ni ne plu povas ŝanĝi la prezon jam fiksitajn por la monatoj oktobro ĝis decembro (kvaronjare 150 mk.).

Du Siciliaj fabeloj.

(Tradukitaj el la Sicilia dialekto.)

1. La testamento de la Sinjoro.

Oni rakontas ke, kiam Jesuo Kristo estis forlasanta tiun ĉi mondon, li estis sendecida, pensante al kiu li postlasos ĉion, kio estas sur la tero. Li pensadis, pensadis: Al kiu mi ĝin lasos? ... Se mi ĝin postlasos al la Burĝoj, al Nobeloj kio restos? Kaj se mi postlasos ĉion al la Nobeloj, la Burĝoj kion ili faros? ... Kaj la Kampuloj? ... Kaj la Majstroj-laboristoj? ... Vere, li ne sciis kiel decidi.

Dume, jen, alvenas la Nobeloj: „Sinjoro, ĉar Vi baldaŭ foriros el la mondo, kial Vi ne postlasos al ni ĉion?“ Kaj la Sinjoro disdonis ĉion al ili.

La Pastroj, sciiginte, ke la Sinjoro estas forironta, alkuris mem: „Sinjoro, ĉu nenton Vi lasos al ni forirante?“

„Tro malfrue vi alvenas,“ al ili respondis la Sinjoro, „ĉar mi jam disdonis ĉion al la Nobeloj.“

„Ho! Diabolo!“ ekkriis la Pastroj.

„Do, al vi mi postlasos la Diablon.“

Jen alvenas la Monahoj: „Sinjoro, ĉu Vi lasos nenton al ni, ĉe Via foriro?“

„Nenton, ĉar mi jam disdonis ĉion al la Nobeloj.“

„Ho! Diabolo!“ diris la Monahoj.

„La Diablon prenis la Pastroj.“

„Paciencon!“ diras la Monahoj.

„Do, mi al vi postlasos la Paciencon“, diris Jesuo Kristo.

Alvenis al la oreloj de la Majstroj-laboristoj la sciigo, ke la Sinjoro estas forironta, kaj ili alkuris senprokraste: „Sinjoro, kion Vi postlasos al ni?“

„Tro malfrue, ĉar jam mi disdonis ĉion al la Nobeloj.“

Nia XIV-a en Helsinki.

Solena Ferma Kunsido.

(Nobelara Domo, 15. aŭgusto.)

Sur la estrado: s-o Karl von Frenckell, prezidanto; s-oj Albin Sandström, D-ro Arnhold, T. M. Warden, D-ro Edm. Privat, vicprezidantoj; s-oj Chavet, Setälä kaj Jakob, sekretarioj.

Malfermis la kunsidon s-o von Frenckell, submetante je diskuto la proponon de la Esperanto-Kartelo Nürnberg pri okazigo de la XV-a Kongreso en tiu ĉi urbo. Prezentas la inviton s-o Hönlgsberger, sendito de la unuigo en Nürnberg, per mallongaj impresaj vortoj. Petis la parolon D-ro Arnhold atentigante, ke la invito venas rekte de Nürnberg; la Germana Esperanto Asocio hezitis inviti, supozante, ke estas aliaj pli rajtaj proponoj. Aŭdante la ĝeneralan kon-

sed prezentigas ree okazaj diversaj malhelpoj, kiuj devigas prokrasti ĝis pli favora tempo.

Petas parolon s-o Atanasov (bulgaro), informante, ke li ne havas komision inviti la XV-an Kongreson, sed esprimas certan volon aranĝi la XVI-an en Sofia, esperas tiam saluti la samideanojn en la ĉarma lando de l' rozoj. (Aplaŭdo.)

S-o von Frenckell resumante diras, ke neniam alia invito venis. D-ro Privat petas aklatan akcepton de invito de Nürnberg. Per klaraj, varmaj vortoj D-ro Privat prezentas bildon de Nürnberg, antikva urbo, restadejo de Hans Sachs kaj de la „Meistersinger“. Nia movado estas forte ligata ideo al tiu ĉi urbo, kie vivis Einstein, samnoma famulo malpli konata al la cetera mondo. Li rememorigas la ekziston de antikvaj Esperantistoj en tiu ĉi loko, kie aperis la unuaj broŝuroj en nia lingvo ĉe presejo Tümmel; „La Esperantisto“ aperis samloke. La unua grupo Esper-



La ET-istoj antaŭ la ĵus finkonstruita nova Preslaborejo.

1. S-o Teo Jung, ĉefredaktoro. 2. s-o Henriko Jung, presejestro. 3. s-o Hurler, administristo. 4. s-o Goppel, komponiŝtisto. 5. s-o Fethke, komponiŝtisto-korektisto. 6. s-o Hahn, komponiŝtisto. 7. f-ino Fabel, ekspedistino.

senton de la kongresanoj, GEA kore invitas, ne promesante belajn festojn sed laboron por ĉiuj fortoj. Li kredas, ke la Kongreso multe helpos plifortigi la favoran sintendon de la registaro, kaj forigi la malamikan klododojn. (Aplaŭdo.)

La prezidanto rimarkigas, ke oni funde diskutu neniel influante la kongresaron. Petas parolon D-ro Emiljan Loth, prezidanto de Pola Esperantista Societo; Unua Tulpola Esperantista Kunveno decidis inviti la Kongreson por venonta jaro, sed montrigis, ke tio estas tro frua. Ni ne reprenas la inviton, sed petas tiom da tempo.

S-o Stan. Essigman (Warszawa) klarigas la sintendon de la varsoviaj samideanoj; la kaŭzoj de l' prokrasto estas pure eksteraj, certe ŝanĝiĝontaj post nelonga tempo.

S-o Prof. D-ro Dietterle sciigas, ke la reprezentanto de Aŭstrio, s-o Fiby, jam forveturinta, komisilis lin, inviti la kongreson por 1924 al Wien.

S-o von Frenckell rimarkigas, ke ĝenerale oni ne decidu ion sen severa esploro de ĉiuj kondiĉoj. Ni ricevis invitojn de Wien kaj Warszawa. La demando ne estas, kiu urbo nin allogas. Iam oni intencis la kongreson en itala aŭ bulgara urbo,

antista sub gvido de malnova pioniro de mondlingva ideo, Christian Schmidt, ekestis en Nürnberg. Ne sole historiaj kaŭzoj ekzistas: Ĉarma urbo kun turaj, malnovaj urbomuroj kaj bela regiono. Li insistas je la valoro de konatiĝo kun la popolo, tiom suferanta, heroe elportanta la ŝarĝon de sia sorto. Rekta konatiĝo forigos la dirajojn de denencal gazetoj kaj plifortigos la kredon je la valoro de nia homama movado. Ni iru Nürnbergon!

Longa aplaŭdo sekvis la parolojn de D-ro Privat. La kunveno aklande akceptis.

S-o von Frenckell gratulas la germanajn Esperantistojn dezirante ĉian sukceson al ilia laboro.

Sekvis legado de salutleteroj de Tramlista Unuigo en Wien kaj de s-o de Marich el Budapeŝto nome de la polica Esp. movado. S-o Hans Jakob, Gen. Sekr. de UEA, legis la protokolon de la tria laborokunsido, sabato 12. aŭgusto, notinte iajn korektojn, laŭ peto de s-o Essigman. Diversaj saluttelegramoj, informoj pri ekskursoj kaj alparoloj de s-o Pech el Plzeň (Ĉeĥoslovakio) en nomo de Ĉeĥoslovaka Laboristaro Esperantista.

S-o Eroŝenko, blinda samideano el Peking, salutas la Kongreson nome de samideanoj ĉiuj, insistas pri la paciga rolo de Esperantismo, alvokas je malamo de ĉia milito.

S-o von Frenckell preskaŭ melankolie esprimas sian penson pri forirantaj tagoj, feliĉaj horoj kaj la disiĝo. La revo de multaj el ni dum semajnoj, dum monatoj, estas nia tutmonda kunveno; kvankam ni nun disiĝas, ni kunportas ion, kio restas: la rememoro pri feliĉaj tagoj, pasintaj en gastama lando inter amikoj ĉiulandaj. Tiu ĉi penso kaj la certigo de revido ĉe venonta kunveno forigu la malĝojon de disiĝo. La nuna Kongreso unuigis la disajn fortojn de nia movado kaj donis al ni novan energion; novaj problemoj ekestas; sed ne plu estas samaj kondiĉoj. La mondo nin atentas; ŝajnas, ke ni eniras la oficialan epokon de nia movado, la akcepto ĉe Prezidanto de regno estas paŝo sur vojo de similaj honorigoj. La Kongreso havis bonajn fejn, kiu laboris por ni diligente, senbrue, inter la Loka Komitato, al kiu ni ŝuldas elkoran dankon. Nenia malagrablo, nenia grava plendo! Ni ĉiuj sentis, ke oni atentis nin kaj niajn dezirojn. Tion ni memoru, kaj fortan, sinceran dankon al la komitato kaj ĝial anoj Sandström, modesta kaj trankvila, Vilho Setälä, rapidema kaj direktanta, Kostiaainen, decida kaj energia, Ĉernohostov kaj ĉiuj aliaj! Laŭdon al la nelacigeblaj fraŭlinoj, kiuj rezignante la amuzojn de la Kongreso fidele kaj serveme restis sur la posteno en la Akceptejo, en la Sekretariejo! Koran dankon al vi ĉiuj, via afableco restos en nia koro! (Longa tondra aplaŭdo.)

S-ino Isbrücker, aludante ŝajnan parolemon de la virinoj, konstatas, ke parolis nur viroj, kaj ke sekve tiu aserto ne estas laŭvera (ridoj). Dankas la Kongreson kaj instigas je serioza daŭrigo de nia laboro.

S-o Isbrücker, menciante la Hagan Kongreson, komparas la diferencon kaj rimarkigas, ke la atendoj estas superitaj. Humore proponas translokigi la Lokan Komitaton al Nürnberg por esti certa pri simila bonega aranĝo. (Aplaŭdo.)

D-ro Privat: Volonte ni restus pli longe por pli bone konatiĝi kun la lando. Feliĉaj vi, kiuj povas resti kaj ĝui la belecon de Suomio! La revenintaj Esperantistoj, veraj ambasadoroj de Finnlando, ĉie rakontas pri vi reva, rava lando kun viaj miloj da lagoj, da insuloj, da insuletoj. Nova ŝtono en la fundamento de nia historio estas tiu ĉi Kongreso, kaj neeble estas ĝin forigi. Ni rekte iru nian vojon, malgraŭ baraktoj, malhelpoj, ĝenoj kaj tedoj. Bonan memoron ni kunportas de la lando de Väinämöinen, de Kalevala, ne forgesante la modernan tempon, kun kiu ni povis konatiĝi en la „Nacia Teatro“ per prezentado de riĉa kaj bela programo. Akceptu vi ĉiuj nian koran sinceran dankon: Vivu Finnlando!

D-ro Arnhold persone dankas s-o von Frenckell, kiu instigis lin viziti la Kongreson, gratulas lin pro la gvidado de la aferoj. Ni rememoru, kiom multe li faris por nia movado en Germanio; ni danku lin per sekvo de ilia modela laboro.

S-o Felix Diez (Bilbao) rakontas pri sia vizito en Warszawa, kore dankas al la Kongresa Komitato kaj alportas memorajojn de l' tombo de nia Majstro.

S-o von Frenckell konservas la memorajojn kiel signon de sincera amo al nia Majstro.

S-o Vilho Setälä, vive aplaŭdite de la kunveno, dankas per varmaj vortoj al la kongresanoj por la kunsido, kiun oni havis venante tiom are en tian malproksiman landon. Komparas nian movadon kiel ponton de norda lando al aliaj. Multon plenumis la nuna Kongreso, kaj feliĉaj ni estas havante nun unu organizaĵon. (Longa aplaŭdo.)

S-ino Zamenhof dankas por la gastamo kaj afableco de finnlandaj Esperantistoj.

Sed jen, Evo ekkrias al Adamo: „Ha, kion ni faris? Nun la dek-du kaŝitoj restis sen beno, kaj tial malriĉaj kaj mizeraj.“

„Prava ĉi estas,“ diras Adamo; „nun mi revokos Lin.“ Kaj ekvokas: „Majstro! Ho Majstro!“

La Sinjoro revenas: „Kion ĉi deziras?“

„Majstro, benu ankaŭ tiujn ĉi dek-du, kiuj estis sub la kuvo, ĉar dudek-kvar gefilojn ni havas.“

„He!“ diras la Sinjoro, „malfrue ĉi pripensis. Nun la beno estas dirita; kial ĉi ne parolis, kiam mi demandis? Nun estas nenio plu farebla.“

„Ho!“ diras Adamo tute malĝoja; „Kaj kia estos la sorto de tiuj ĉi?“

„Nu!“ respondas la Sinjoro: „tiuj ĉi servos tiujn laborante, kaj tiuj donos vivotenenon al tiuj ĉi, pagante; ĉar kiu laboras, tiu gajnas la necesajn, kaj la laboron mi benas.“ Kaj li foriris.

Tiel okazis, ke en la mondo, duono de la homaro estas riĉa kaj duono malriĉa, kaj tiu ĉi servas la unuan, kiu ĝin vivotenas.

Tradukis

Stefano La Colla, Palermo.

(Eliritaj el la bonega verko en itala lingvo: „Morjo kaj kuitimoj de la kampuloj en Sicilio, skizitaj de Salvatore Salomone Marino“, Palermo, eld. Remo Sandron, 1892.)

Virina sorto.

En la montoj tataraj

Staras krucoj karaj;

Sur unu forlasita

Estas enskribita:

Jen kuŝas

Stefan' Nagy

56-jara viro

Mortis por patrujo en la militiro.

Funebras flineteto

Lia Lisbeto.

Sur lu albana monto

Apud malgranda fonto

Same enĉizita

En kruco forlasita:

Stefano Nagy

56-jara soldato;

Kape lin trafis pikbato.

Funebras edzineto

Lia Lisbeto.

En la alpoj tirolaj

Estas tomboj sennombraj;

Inter nomaro tie

Vi legas kortuŝite:

Stefano Nagy

16-jara junulo

Brustpafite mortis la bravulo.

Funebras patrineteto


Lia Lisbeto.

Hungare verkis Tom. Einöd,
tradukis Georgo Steiner, Győr.

Eterna Juneco.

De K. Scheinplugg.

Mi revenas ĉiutage malfrue vespere tra parko, kaj ĉiutage mi vidas en tiu silentiginta parko parojn de geamantoj sin premanaj unu al alia sur la benkoj. Same printempe kiam siringo bonodoras, somere kiam ilioj floras, aŭtune kiam folioj falas, vintre kiam neĝo fajreras sur branĉoj. Mi ne konas ilin, mi ne distingas iliajn vizaĝojn, mi scias nenton pri iliaj sortoj. Sole tiun ĉi vesperan ravigan momenton mi vidas kaj ŝajnas al mi, ke tio estas ĉiujfoje la samaj geamantoj, ke ili sidadas tie ĉi jam de jardekoj aŭ jarcentoj. Eble ŝanĝiĝas ilia vesto, frizaĵo, parolmaniero,



Rigardo en la Kompostejon de ET.

S-o Grenkamp (Jasio) kaj Naria esprimas siajn dankojn, sekvataj de forta aplaŭdo. S-o von Frenckell fermas la Kongreson; post komuna kantado de la himno la kongresanoj disiras.

Kunveno de Teknikistoj.

La Esperantistaj teknikistoj kunvenis la 12-an de aŭg. en Etata Domo. Ĉeestis 11 teknikistoj el 6 landoj. S-o ing. Saraola (Helsinki) salutis en la nomo de Finna Teknika Asocio (Suomalaisien Teknikkojen Seura). Oni elektis s-on Saraola prezidanton kaj s-on Ekström (Turku) sekretario. La tagordo prezentita de s-o Attila (Helsinki) estis akceptata. La unua demando en la tagordo estis demando pri ev. fondo de teknika asocio. Post detalaj klarigoj pri la Internacia Scienca Asocio donitaj de D-ro Döhler (Ries) oni decidis ne fondi apartan memstaran teknikan asocion sed aliĝi al la ISA kiel nova sekcio: Internacia Teknika Asocio (ITA). Samtempe oni decidis peti s-on Stromboli (Torino), la iniciatoron de Unuiĝo de Teknikistoj Esperantistoj, gvidi la aferojn kaj mem elektii helpantojn. Ankaŭ pri la dua demando en la tagordo, pri teknika vortaro, D-ro Döhler raportis. Li sciligis, ke jam estas farita granda laboro de s-o Wüster. La raportanto petis la ĉeestantojn helpi s-on Wüster, ĉiu en sia speciala fako, kiun peton la kunveno akceptis. En la tagordo estis ankoraŭ demando pri plibonigo de fakaj sciigoj de laboristoj, sed pro manko de tempo oni ne povis diskuti ĝin. Fine D-ro Döhler parolis pri propagandmetodoj de Esperanto en teknikaj rondoj. La teknikistoj vizitis laktofabrikon „Valio“ kaj la elektrajn fortostaciojn de Helsinki.

Pliajn raportojn

pri la XIV-a (specialaj aranĝoj, kunvenoj ktp.) ni publikigos en la venontaj numeroj.

Laboristaro.

SAT.

La 2-a Kongreso de Sennacieca Asocio Tutmonda (SAT), kiu okazis la 12.—16. aŭgusto en Frankfurt (Germ.), sub la honora prezideco de Romain Rolland ĵus finis siajn laborojn. 220 delegitoj el 12 nacioj, reprezentantaj la tutan mondon partoprenis la debatojn. Kelkaj organizaĵoj estis reprezentataj, inter kiuj ni citas: La germana intersindikata unuiĝo (Arbeiter Union), La Federacio Internacia de la Artoj, Sciencoj kaj Belartistiko ktp.

SAT celas elcerpi nacismon, kiu kuŝas en la koro de ĉiu individuo, kaj kreskigi sennaciecan spritishton per konstanta rilato inter siaj membroj. SAT ne estas politika asocio, ĝi nur celas meti

sed tio estas la samaj flamentaj vangoj, pastaj kapoj, la sama korbato. Eternaj geamantoj. —

Kiam mi estis studento, mi veturadis por somera libertempo hejmen en kamparon. Mi havis tie mian arbaron, kien mi ĉiutage iradis, mian vojeton kaj apud ĝi mian formikejon. Mi observadis formikojn ĉiutage dum multaj jaroj. Ĉiam la malfrankvila vivo, klopodo kaj rapido, la samaj formikoj. Ili ne ŝanĝiĝis, ili ne mortis, ili havis la samajn formojn de korpoj, la saman koloron, la samajn movojn. Eternaj formikoj.

En la parko dum silentiĝinta vespero mi rememoras ofte pri la formikejo en la arbaro. Kaj mi pensas: se mi estus Dio, vivus eterne kaj preterirus ĉiutage, mi havus la impreson, ke la geamantoj sur la benkoj estas la samaj, mi ne distingas diferencon de la tempo, kostumo, formo, kiel mi ĝin ne distingas en la formikejo. Sen nomo, sen diferencoj de vizaĝoj, korpoj, pensoj, koroj, la homa speco, — homo — de kie aperinta? — venadas ĉi tien, sin premas unu al alia, revas —. Ne homoj venadas tien ĉi, sed la eterna juneco mem, kiu aranĝas ĉi tie rendezuojn ĉiutage tra ĉiuj epokoj.

El ĉeĥa lingvo tradukis Mlila Vokřálková.

Neekspedebila letero.

Mi estis skribinta leteron al mia eksterlanda amiko-Esperantisto. Mi estis sendonta al li mian portreton, mil dankojn pro lia afabla letero kaj belaj poŝtmarkoj; rekompence mi aldonis centkvindek mialandajn poŝtmarkojn, multfoje mi promesis fari diversajn komplezojn kaj finis la leteron per mil bondeziraĵoj kaj sinceraj salutoj.

Vi komprenas, ke tiel riĉenhava ŝarĝo faris la leteron sufiĉe ampleksa: veninte poŝtejon mi do ĝentile petis la fraŭlinon, kiu akceptas la enregistrotajn sendaĵojn:

Parolejo.

123. Por atento de sendantoj de presajoj.

La sendantoj de presajoj (gazetoj, libroj, katalogoj) kredinde povas konstati ke kelkajn sendaĵojn ricevas personoj, al kiuj ili ne estas destinitaj, kaj kelkaj perdiĝas dum vojaĝo. Per tio povas esti diversaj kaŭzoj; sed mi volas noti unu, dependantan de la sendantoj.

Servente en Tallinn'a poŝtoŝtelo, mi havas la eblecon vidi, kiel en eksterlandaj poŝtstakoj kelkaj presajoj, precipe gazetoj, estas sen adresa banderolo. Kompreneble estas ankaŭ ĉirkaŭ ili meitaj la banderoloj, sed ili estas el tre malbona papero kaj tre mallargaj kaj tial, ĉar dum la transporto la sakoj estas kelkajn fojojn transmetataj de unu loko kaj veturilo sur alian, ili en la sakoj disŝirigas. Dum laŭ-adresa dispecigado oni metas flanken la trovitajn sen banderoloj presajojn kaj la disŝiritajn banderolojn, kaj poste ili ĉirkaŭmetas laŭ formata grandeco kaj ĉirkaŭligas per ŝnuro. Tiamaniere oni interŝanĝas la banderolojn kun alia samformata, se ĝi ne havas nomon de enhavata presajo, kaj lam oni tute ne trovas banderolon por ĉiu. El tio ankaŭ sekvas la malbono, ke la adrezo ne ĉiam ricevas sendaĵojn laŭ ordo. Sufiĉe bone oni sendas presajojn el Finnlando kaj Germanio: la banderoloj estas el forika papero kaj havas larĝon de enhavata sendaĵo. Plej malbone oni sendas francajn gazetojn: la banderoloj estas el maldika, malbona papero kaj larĝaj nur 4—8 centimetrojn. Tiaj banderoloj tre ofte disŝirigas. Tial estus dezirinde, ke la sendantoj ĉirkaŭmetu pli bonajn banderolojn al siaj sendaĵoj kaj pli grandajn kaj pli pezajn ankoraŭ ĉirkaŭligu per fadeno aŭ ŝnuro.

Krom tio mi povus ankoraŭ rememorigi unu, jam per mem sciatan aferon, kaj tio estas: skribu adreson legeble.

(J. Vahtkeri.)

Recenzejo.

LIBROJ.

GVIDLIBRO TRA BRNO, ĉefurbo de Moravio. 16 paĝa, ilustr. Prezo 1.50 Kč. Ricevebla de J. Sembera, Brno, Ĉeĥoslovakio, Francourská 72.

AFIŜOJ, PROPAGANDILOJ, ktp.

Germanlingva prospekto de li-a Foire de Reichenberg enhavas tulpaĝan alvokon al komercistoj uzi Esperanton

GAZETOJ.

Brazila Esperantisto. Majo-Junio.
Holanda Esperantisto, 24. 8. (Duobla numero.)
Esperantaký Zpravodaj, aŭg.
Hungara Esperantisto, jul.—aŭg. (Speciale ampleksa duobla numero 36 paĝa kun ilustraĵoj, pro la okazonta IV-a Hungara Esp. Kongreso en Miłokolcz, 26.—27. aŭg.)

Gazetaro.

Pri la XIV-a

skribis multaj gazetoj ĉiutlandaj, precipe la gazetoj en la kongreslando mem. Artikolojn en Esperanto ni trovis en Uusi Suomi, Helsinki Sanomat, Työmies kaj Sosialidemokraatti. Multajn artikolojn en kaj pri Esperanto, anoncojn de gravaj firmoj en Esperanto, ilustraĵojn pri la kongreso, portretojn de la Majstro kaj de Esp. „eminentuloj“ kaj bonegejn karikaturojn ni trovis en Uusi Suomi. Monarkista „Itälehiti“ nomas la XIV-an „Humbuugi-kongreson“ (Carlatanaja kongreso). El svisaj gazetoj raportitaj pri la XIV-a ni nomas Express de Neuchâtel, Le Travail (Genève), Le Droid du Peuple kaj La Revue (Lausanne), Journal de Genève, La Gazette de Lausanne, Berner Tagwacht, Solothurner Tagblatt, La Tribune de Genève, Courrier de Genève, La Tribune de Lausanne, La Suisse (Genève); francaj: Le Petit Parisien 22. 8., L'Ére Nouvelle 24. 8., La République de Beauval 24. 8., Le Journal du Peuple (Paris) 19. 8., La Moselle Républicaine (Thionville), Le Progrès de Lyon, Le Lyon Républicain; angla: Morning Post (London), Daily Herald (London); belga: La Métropole (Antwerpen) 11. 8.; kaj precipe multaj germanaj ĵurnaloj, kies cito forprenus tro da loko.

Yorkshire Telegraph, 15. 7. (Pri cirkulero de franca ministaro.)

La Coopération, Basel, 5. 8. (Art. de D-ro Privat.)

La Métropole, Antwerpen, 5. 8.


L'Indépendance Belge, Bruxelles, 24. 7. (Mal-favora art.)

Le Soleil de Marseille, 19. 8. (Art. pri Esp.)

Reichenberger Zeitung, 26. 8. (Pri la XIV-a.)

Dos Naje Lebn, Białystok, 18. 8. (Judalingva ĵurnalo, enhavas 1-an artikolon de serio pri Esp. Antaŭkongreso Danzig.)

Sonne der Wahrheit (Bahal-organo), Stuttgart, aŭg. (Artikoloj en Esp. Noto, ke je 16.—18. sept. okazos Bahal-kongreso en Stuttgart.)



Rigardo en la Presejon de ET.

kaj mi iradis de unu fraŭlino al la alia; unu ordonadis aĉeti plian kvanton da poŝtmarkoj, la alia donadis ĉiufoje po kvar folioj jam abomenaj por mi ducent-kvindek-rublaĵn markojn.

Kiam mi faris tion ĉi la dekan fojon, la letero tiel ampleksigis, ke mi apenaŭ povis ŝovi ĝin tra la fenestreto.

„Via letero pezas cent-sepdek-sep kaj tri dekonojn da gramoj, je du kaj tri dekonojn pli multe ol la leĝo permesas por letero,“ diris al mi la ĉarma oficistino, „ĝi ne estas ekspedebila.“

Originale verkita V. Tenisov, Barnaul (Siberio).

Danzig-a Antaŭkongreso.

Ĉar mi estis petata de unu el lokaj gazetoj doni al ĝi detalan raporton pri, laŭ ĝia opinio, certe tre interesa ekskurso al Danzig, mi pensas, ke tiom pli interesos tiajn samideanojn sciigi kelkon pri tiu ĉi okazintaĵo.

La 2. aŭgusto vespere mi forlasis Krakovon per rapida vagonaro kaj venis je 7-a horo matene Varsovion. En la stacidoma restoracio renkontinte s-anon Joŝo el Białystok, kun goĵo mi sciligis, ke jen la kronikaĵo legita antaŭ kelkaj semajnoj en ET pri aranĝata karavano el Varsovio efektiviĝas kaj ke ĝuste je la 10-a jtm., t. e. per la sama vagonaro, kiun mi estis uzonta, la karavanoiros Danzigon. Kia goĵo estis do renkonti jam evanĝonigintajn Varsovianojn, inter kiuj mi trovis nian estimatan prof. Buiwid, s-ojn Tejchfeld, Oberrotman k. a. Eĉ du nepollandanoj enestis: s-o Varenkin el Nijni Novgorod (Rusujo) kaj red. Maruzzi el Zagreb (Jugoslavio), kiun ni tuj ekkonis laŭ vidita iam en ET fotografaĵo de la redaktejo de „Konkordo“. Nu, la vojaĝo do ne estis enuiga! Imagu ja, ke dum plena tago ni povis ĝis sateco paroli kaj babili, precipe, ĉar preskaŭ ĉiuj el la kunvojaĝantoj estis perfektaj

Anoncetoj.

Familaj anoncetoj senpage. Aliaj anoncetoj (nur akceptataj por minimume du sinsekvaj enprezoj) kostas po du enprezoj kaj po 20 vortoj (krom unu adreso) 0.20 dol., 0.20 flk., 1 nord. kr., 1 sil., 1 sviz. fr., 1 pes., 2 franc. aŭ belg. fr., 3 lit., 7 fmk., 8 Kč., 120 gmk., 120 hung. kr., 400 pmk., 3000 aŝtr. kr. Ĉiu povas pagi per lin al la nomita valutoj, sed laŭ la aktuala kurzo de sia propra valuto, aŭ 5 stamp. resp.-kup. Anoncetoj, kies valuto ne estas nomita, povas pagi egalvaloron de 2 franc. fr. Ĉe rektaj abonantoj ni deprenas la pagon por anoncetoj laŭdezire de la abonkanto, de aliaj ni enprezas anoncetojn nur post antaŭpago. — Anoncetoj devas alveni 10 tagojn antaŭ publikigo. — Abonantoj mobiluloj ni akceptas nur de 1000 kr. aŭ pli, polojn de 100 mk. aŭ pli.

AVIZO.

Pro manko de loko en la hodiaŭa numero ni devas prokrasti la publikigon de la pli multaj anoncetoj pri interŝanĝo kaj korespondado ĝis venonta numero.

EDZIĜO. S-ano Johano Kratochvilla, instruisto en Sereď, edziĝis kun I-ino Březka Simonovská el Nitra.

ESPERANTISTAJ MARISTOJ. — 21-jara junulo petas servon sur ŝipo; ĉu troviĝas inter vi helpemulo, kiu povos provizi ĝin al mi? — Otto Sall, 6 Peetri t. 184, Narva, Estonio.

SENPAGE ni povus liveri al ĉiuj abonantoj la Literaturan Aldonon, se ĉiu varbus ankoraŭ unu novan abonanton al ET.

MEMORFOLIO. — La salutpoemo de D-ro Kolomano de Kalocsay por la XIV-a en Helsinki aperis kiel memorfolio. Ricevebla por unu resp.-kupono aŭ pluraĵ ekzempleroj por egalvaloro en nacia mono de Paŭlo Balkányi, Budapest VI, Hajos utca 15-II-2. Samloke ricevebla por sama prezo la teatraĵo „Paĝio kaj Reĝino“, trad. de K. de Kalocsay.

Korespondo kaj Interŝanĝo.

Georgo Teterin, Petrograd, Ruslando, Fontanka 21, ne povas pli korespondi pro frege alia poŝta tarifoj (leteroj 450 000 rubl., poŝtkarto 270 000 rubl.)

S-o Edouard Jamois, 3 str. Moulin, Saint Denis, Seine, Franc., deziras interŝanĝi poŝtkartojn kaj poŝtmarkojn kun gesamideanoj de ĉiuj landoj.

Adolf Vanček, Solnice, Ĉeĥoslovakio, interŝanĝas poŝtmarkojn kun ĉiutlandanoj.

Abonejoj de ET

en la landoj

Aŭstria: Ferd. P. Huber, Mönchberg 5, Salzburg; por Wien: „La Esperantisto“ (d-ro E. Pfeffer), Wien I/1, Postamt 34.

Belgia: Frans Schoofs, 45, Kl. Beerstraat, Antwerpen. Poŝteka n-o 28429.

Brazila: Brazila Ligo Esperantista, Praça 18 de novembro, Rio de Janeiro.

Bulgara: Georgi Rr. Găvevski, Bnl. Marie Luiza 46, Soŝia.

Ĉeĥoslovaka: Otto Sklenka, Hradec Králové. Otto Lumpe, Trautena.

Estona: Est. Esp. Unuiĝo, poŝtkast. 6, Tallinn.

Finna: O/Y. Movado A/B., Kasarminkatu 20, Helsinki.

Francia: Esp. Centre Librelo, 51 rue de Cligny, Paris 9.

Hispana: Konrado Doménech, Caldea de Melaveña, prov. Orona, Vichy

Catalan.

Hungara: Paŭlo Balkányi, Hajos-utca 15-II-2, Budapest VI.

Japana: Morizo Ga, 16-V, Kitamachi, Aojama, Tokio.

Jugoslava: D-ro Dušan Maruzzi, Zagreb, Jezuitska ul., br. 1.

Latvia: Talvaldo Indra, Riga, Pasta kaste 47A.

Litova: Paŭlo V. Medem, Smellu g-vē 12, Kaŭnas (Kovno).

Nederlanda: J. Ravenslin Jr., v. Aerssenstraat 200, 'a-Gravenhage. (Poŝteka konto Haag n-o 2674.)

Pola: Adolfo Oberrotman, Krak. —Przedm. 10, Warszawa. (P. K. O. n-o 5136)

— Pola Esp. Servo (Fr. Prengel), Kordeckiego 1a, Bydgoszcz-Bromberg.

Rumana: Esperanto-Oficejo, Cluj.

Rusa: Mikaelo Valentinov, Cudovskoj per. 6, Komitato de Esperantistoj

SVIAZI.

Sveda: Förlagsföreningen Esperanto, u. p. a., Stockholm 1.

U. S. A.: The Esperanto Service Corporation, 600 Fifth Avenue, New York City.

Koopera Banko Agrikola

GENTRO DE LA SINDIKATOJ, SOFIA, BULGARIO

Fako: Koopera Konsorciumo por eksporto de grenaro. Organizaĵo de ĉiuj grenproduktistoj en Bulg. Disponas ĉiam grandajn kvantojn de grenaro (greno, maizo ktp.) en havenoj de Danubo kaj Nigra Maro (Varna, Burgas). Skribu en Esperanto!

Adreso: Banque Agricole Coopérative, Centrale des Syndicats, Str. Vrabĉa 1, Sofia, Bulgario. Adreso por telegramoj: Kooperkonsor, Sofia.



Oni postulu la „Victoria“-Eksport-preziston

en germana-hispana aŭ germana-angla lingvoj.

Skrapilego „Be-De“

D. R. P. an.; D. R. G. M.

Mem-agema, por fruktiglacio-maŝinoj, nepre necesega por sukerajsteloj kaj kafeloj. Ĝi anstataŭas tutan laborforton, konsumas en minimuma grado la nun multekostajn maŝinojn, kaj per ĝia bonega knedigado de la glacimaso donas delikatan kaj pli profitan glacian ol per mana skrapado. — Liverebila por ĉiu maŝino, konvenanta al ĉiuj sistemoj Bonega ellaborado estas garantiita. Sinceraj interesemuloj kaj reprezentemuloj en ĉiuj landoj bonvolu por plialtigi sian turni nacilingve aŭ precipe Esperantilingve al la unusola fabrikanto:

Peter Mommertz, ingeniero, Germanio, Mülheim-Ruhr, Althofstrasse n-o 10.

FTM INTER-NACIAJ FOIROJ FRANKFURT A. M.

Aŭtuna foiro de 8-a ĝis 14-a oktobro 1922.

Ampleksa specimena ekspozicio. 50 branĉoj sur unu tereno. Masiva foirdomoj. Uzu niajn presojn kiel reklamon por ni kaj samtempe por Esperanto! — Petu regulan alsendon de informoj de

Messamt (Esperanto-fako) Frankfurto a. M.

La tuta mondo konas la nekompareblan Italian marurbon

VENEZIA

sed ne ĉiu konas la „mostarda veneziana“, ĝlan el diversaj sudlandaj fruktoj faritaj spektaklaj. — Postulu prezaron pri niaj mondkonataj specialaĵoj: Marrona glacés, torrone, glaĉigitaj kaŝtanoj envolvitaj en ŝtanfolio ktp. — Seriozaj reprezentantoj serĉataj.


Confiserie Italiana, Milano
Via Crocefisso 16 (Italo).

G. Mansfeld, Merseburg/Saale (Germ.)

Krudoleaj motoroj

„Optimus“ D. R. Patento.
4-60 HP.

Fiksitaĵ kaj ŝipaj motoroj.



Eksporto el Germanio.

Mi serĉas en ĉiuj landoj aĉetantojn por izolita kupra metalfadeno

por elektraj kondukiloj (NGA. 1-16 mm²). Demandojn de seriozaj komercistoj, kiuj povas fari bankakreditivon aŭ pagi antaŭe, peras la administrado de „Esperanto Triumfonte“.

Georg F. Klefe,

Ekspedojn al ĉiuj terpartoj.

LUBECK (Germanio) Eksport-Agentejo,
Informejo — Establ. 1901.

Por Anglujo

Ni serĉas agentejojn komercajn ĉiujn ŝtatojn gasaĵojn karbidon murtapetojn

W. & R. Brerley
Waterloo, Ciltieres
Anglujo.



katunajn fabrikelajn akcesoraĵojn; baldaŭ specimenojn kaj liverprezojn.

Orienta Siberio.

Komercaj ĉambroj, firmoj kaj oficejoj de internaciaj foiroj, dezirantaj per Esperanto interilali kun komercaj organizaĵoj kaj entreprenoj de Orient-Siberia Respubliko, skribu pri siaj deziroj kaj proponoj al nia Centra Esperanto Komitato kaj sendu al ĝi prospektojn, katalogojn, reklamilojn, enketojn ktp. por disvastigo inter komercaj organizaĵoj. Krom Esperanta presado oni akceptas ankaŭ verkitaĵojn france kaj germane, sed korespondadoj ĉiam devas esti verkitaĵoj nur Esperante. — Adr.: u. Ĉita, Orient-Siberia Respubliko, poŝtkesto 36.

Knoll & König, Zittau

(Saksujo—Germanio)

FABRIKO DE KOTONAJ
KAJ DUONLANAJ SUBSTOFOJ
(SERĜEOJ KAŜ SATINOJ.)

Telegr. adr.: Textilknöllg
Telefono: N-oj 1019/1020; Mosse-Code.
Esperanto uzata.

Nederlanda Anonima Societo
Luksa-pano Fabrikoj
antaŭe Henri J. Carels.

50 Butikoj;
Den Haag, Haarlem, Amsterdam.

Luntejo Carels

(ĉefo: H.A. Scharwächter)

63 Weimarstraat, Den Haag.
Oni parolas Esperanton.

Vestu vin

bone kaj malmultekoste!

Mi liveras bonstofajn pantalonojn ĉiuspecajn (konfektionajo kaj laŭ mezuro) Liveranto al multaj Esperantistoj. Postulu preziston kaj specimenojn de

Joh. P. Schmidt, Zittau i. Sa. 85 (Germl.).

ARTEFARITAJ FLOROJ

fruktoj kaj folioj, ligitaĵoj aŭ unuopaj por ornamo de kapeloj, dekoracioj kaj tombogirlandoj.

Fabrikelo
EDGAR ROITZSCH, SEBNITZ i. S. (GERM.)

Esperanto Service Corporation

„Esko“

500 Fifth Avenue New York City

Telegrafa adreso: Esperanto New-York.

Aĉeto, eksporto, importo kaj maklerado de ĉiuspecaj komercaĵoj.

Katalogoj, prezaroj kaj specimenoj estos danke ricevataj.

Nur 250 ekzempleroj estas ankoraŭ riceveblaj de la romano
LA SENLINGVULO

Tial mendu tuĵ!

Prezo por bonvalutuloj 1 avis. tk. aŭ egalvaloro (antaŭa pago) Malbonvalutuloj demandu la prezon ĉe ni.

Butin & Jung, Godesberg, Germ.

Bahnhofstr. 30.

Ĉu vi iam varbis

? 1 ?

abonanton al ET? Se ne, tuĵ faru tion! Ĉiu plia abonanto pilfortigas la situacion de ET kaj per tio samtempe la Esperanto-movadon.

Grava al Maŝinfabrikantoj.

Aŭstralia fabrikanto deziras katalogojn kun prezoj de la plej ĝisdatataj maŝinoj por la fabrikado de ŝtalfadenoj kaj najloj. Prezoi en germana aŭ angla mono pakitaĵ kaj liveritaĵ libere surŝipe Hamburgon. Sendu respondon tuĵ al

R. RAWSON, vic-delegito de UEA
212 Swanston Street, MELBOURNE, Australio



ANSICHT VON DER HANICHNER-STRASSE

Gastejo — Kafeto — Sukerajejo

„FRANZENSCHÖHE“

Franzendorf apud Reichenberg (Ĉeĥoslovak.)

kvin minutojn de ĉefstacidomo Reichenberg. En la proksima veturilsango de la elektra tramo (linio Jesken, 1010 m). Somere plej belega, ombra ĝardeno en senpova situacio. Koncertplacino kaj orkestro. Vizito petata. Esperanta gazetaro. Renkontejo de ĉiuj esperantistoj. Oni parolas kaj korespondas Esperante.

Ferdinand Kauffers, Vicd. UEA, mastro
kaj **Ferdi Gahler, sukerajisto.**

Dr. Vogt'sche Bank, Stuttgart, Germ.

Wallruthbau Komandit-Societo Friedrichstr. 13

Telefono: N-oj 11459 kaj 11459. — Telegr.-Adreso: Bankvogt.

Aĉeto kaj vendo de valorpapiroj.
Procentado de kontantaj deponoj.
Aĉeto kaj vendo de fremdaj valutoj.
Perado de ĉiuspecaj negocoj.

Anoncoficejo kaj Gazetoficejo „Promien“- (Radio)

Warszawa, str. Widok 19

akceptas anoncojn por ĉiuj jurnaloj de la mondo, peras abonon de ĉiuj gazetoj.

Oni korespondas Esperante.

El la Esperantista Vivo.


Malgranda elekto de aktualaj ilustraĵoj aperintaj en diversaj numeroj de „Esperanto Triumfanta“.



Du konataj finnaj samideanoj.
Albin Sandström, prezidanto de la LKK Helsinki, kaj Vilho Setälä, redaktoro de „Esperanta Finnlando“. (El ET n-o 96.)



Grabowski (†) en la mezo de Lodz'aj samideanoj. (Bildo el ET n-o 60.)



Pioniro de Esperanto en Oriento.
S-o R. Vonago, notario, prezidanto de Esp. Societo en Vladivostok. (El ET n-o 67.)



Organiza Komitato de la II-a Rumanlanda Kongreso. (El ET n-o 97.)



Kunsido de la Instruista Konferenco en Ĝenève.
La plej granda sukceso de Esperanto en nuna jaro estis sendube la Instruista Konferenco, okazinta Paskon (16.—20. aprilo) en Ĝenève (Svislando). Jam en sia numero de 25. aprilo ET povis raportiri pri la unuaj tagoj de la konferenco; detalaj artikoloj aperis en la sekvintaj numeroj. (Bildo el ET n-o 82.)



D-ro Fuljanda en Cluj (Rumanio).
Detalaĵoj en n-o 98.



Organiza Komitato de la SAT-kongreso,
ĵus okazinta en Frankfurt a. M. (El ET n-o 97.)

5 000
Jen la regula ĉiusemajna eldonnombro aspirata de ni. Helpu ankaŭ vi, kienialngu ĝin en tiu ĉi vintro!



La presejo de la blindula (reliefpunkta) Esp. gazeto „Esperanta Ligilo“.
La bildo montras s-on Harald Thilander kun edzino kaj helpanto. Legu specialajn artikolojn pri la Esp. movado inter blinduloj en ET n-oj 56 kaj 64! (Bildo el ET n-o 56.)



Anoj de Nordorienta Esp. Federacio de Anglujo
dum ekskurso de Newcastle al Wylam en la valo de l' rivero Tyne. Unu knabo tenas numeron de ET. (El ET n-o 94.)



Rusa Sekcio de ELA.
De maldekstre: s-anoj Nekrasov, Hajdovski-Pečenego, Polakov, Basov kaj Deŝkin. El n-o 95.



Aŭtomobil-Ekskurso
de nederlandaj gesamideanoj el Hago al „De Kievier“ la 16. Julio 1922. (El ET n-o 95.)



Esperantista Kabareto „Verda Kato“ en Paris,
post prezentado de „La kontraŭvola kuracisto“ de Molière. (El ET n-o 92.)



La „Esperantista Rondo Amika“ (ERA) en Budapest,
kies gvidanto estas artisto s-o Julio Baghy; sidas sur la bildo en la mezo. (El ET n-o 83.)

Nova vojo por disvastigi Esperanton.

Legante la Esperantajn gazetojn de la tuta mondo, unu voĉon unuaniman, ĝeneralan, potencon kaj ripetitan oni aŭdas super la aliaj, t. e.: necesas mono por propagando, necesas mono por presi gazetojn kaj librojn, necesas mono por triumfigi Esperanton. — Por atingi la celon, oni malfermas subskripciojn, oni petas subtenojn kaj oni elpensas mil malgrandajn diversajn manierojn por ricevi mizerajn sumojn, kiuj malŝparigas la tempon kaj lasas la aferojn pli nebula ol antaŭe.

Laŭ mia opinio estas neutila iluziigi: ne per ofermoj aŭ almozo oni povas solvi la problemon. Tion estas vera, ke la propagando ankoraŭ malfortiĝas, la eldonadoj vivas peno kaj mallonge, la venko de Esperanto estas ĝis nun revo.

Pensante tion ĉi, mi konkludas: Se estas vere, kiel oni predikas, ke Esperanto estas lingvo praktika, kiu taŭgas speciale al la internacia rilatoj komercaj, kial ni ne tuj fondas kaj organizas inter ni konvinkitaj Esperantistoj unu aŭ pli gravajn internaciajn komercajn administracojn, kaj ne destinis parton de la profilo por la disvastigo de Esperanto? Per tio ni montrus fakte la praktikecon kaj utilecon de nia lingvo.

Multaj aliaj institucioj utiligis tiun efikan kaj certan rimedon. Ni imitu ilin!

Mi proponas min labori serioze laŭ tiu direkto kaj atendas konkretajn proponojn tiurilate de ĉiuj personoj, kiuj havas la saman opinion.

Kom. Saccani Kav. Berardo,
Via Talucchi 1,
Torino 4, Italio.

La Universala Ritmo.

Laŭ novaj ideoj de la materio, oni rigardas atomojn kiel aferojn de pozitiva elektrigo entenantajn erojn ŝarĝitajn de negativa elektro, kaj nomitajn elektronojn. Oni supozas, ke ĉi tiuj elektronoj sin ordigas ĉirkaŭ centro de pozitiva elektrigo: ili neniam estas senmovaj, sed senĉese moviĝas ĉirkaŭ centro de atomo, kaj ilia rapideco estas el sama klaso kiel tiu de la lumo. Diagrama figuraĵo de maniero de illa grupiĝo ĉiam estas laŭforme simetria.

Fina ĥemia atomo estas, laŭ diro de Lordo Kelvin, efektive rotaciaĵo, aŭ elektra centro de forto kaj movo aŭ vibrado. Prof. Fraser prikskribas atomon kiel „veran eteran bobelon“, kaj ĉi tiu bobelo havas, kiel filmon, „tavolon de eteraj eroj, kiuj rapidege rotacias“. Prof. R. K. Duncan skribis: „Kiel fantazia danco ĝi estas, ĉi tiu danco de atomoj... Ĉi tiuj atomoj estas plej grava afero en la mondo por ni, ĉar ili estas ni, almenaŭ fizike... Tuta la spaco tremetas pro ondoj de radiantia energio... Ondoj de radiantia energio formas tiel nomitan „harpo de la vivo“. Ni vibras simpatie kun malmulte da kordoj ĉi tie kaj tie... Ĉi tiu tagon ni konos la plenan amplekson de ĉi tiu grandioza harmonio, kaj en tiu tempo ni vibros akorde kun la Majstra Muzikisto de ĉio ĉi... Homo estas svarmo de atomoj, vibrantaj, brilantaj.“

Ĉi tiu interna vibrado penas trovi eksteran esprimon ĉe homo kaj besto. Ĉi tiu inkerto, birdoj, reptiloj kaj bestoj faras ritmajn movojn, kiujn oni povas rigardi kiel primitivajn dancojn, kaj dancas la homo dum ĉiu stato de sia evoluado, de plej primitiva ĝis plej civilizita.

Sola vera grupo trovata en Aŭstralio (Antigone australasiana, nomita „Brolga“) are kunvenas kaj dancas specon de kvadrilo. Inter aŭstraliaj indiĝenoj plej ordinara muzikilo estas tiu, kiu utilas por batado de taktio. Fela kovrilo etendita trans genuoj kaj frapata per bastono taŭgas kiel tamburo. Batado de bumerango (t. e. speco de

trancilo) kontraŭ bastonego, manklakado, aŭ batado de tero pere de bastonego, same havigas taktion.

La danco estas plej malnova el ĉiuj artoj, kaj la tuta socia vivo de primitiva homo alcentriĝas ĉirkaŭ la dancado. Ritmaj paŝoj kaj saltoj de tia homo estas instinkta esprimo de natura sento, kaj ĉi tiu sento estiĝas el senĉesa atoma ritmo en lia korpo. Ankaŭ la muziko ludas gravan rolon en la vivo de nigrolo. Ĉi tiu aŭstraliaj melodioj estas speco de elnaza unutono aŭ psalmodio, dum aliajn akcentigas subitaj kaj oftaj moduloj de la voĉo. Eŭropano povas eltrovi malmulte da melodio el ĉi tiuj kantoj, tamen post iom da tempo li eksentas, ke ekzistas ia allogo en ĉi tiuj solojaj kaj horajoj. Ĉi tiu ĉi tiuj kantoj estas senpreparitaj, sed pli malpli ili konformiĝas al ritmo de muziko, kaj ili estas, fakte, primitiva poezio. Sammaniere, ritmaj vibradoj en korpo de moderna poeto instigas al li esprimon de liaj sentoj en melodia versaro. La poezio estas pli malnova ol la prozo.

Ni vidis supre, ke relativaj pozicioj de elektronoj estas montrataj diagrame per simetriaj figuraĵoj, kaj tiuj figuraĵoj estas sola bilda metodo por montri ritmon, tial ke ili montras dum momento haltigitan movon. La simetrio estas statika egalvaloraĵo de la ritmo. Diversaj geometriaj formoj de kristaligado estas eble ŝuldataj al variantaj molekularaj ritmoj de mineraloj. Tial oni ne miras trovante, ke multaj el primitivaj desegnaĵoj uzataj en skulptaĵoj, ĉizitaĵoj, korbaĵoj, k. c., konsistas el simetriaj, geometriaj, kaj ripetitaj figuraĵoj. Ĉi tiu estas bazo de la ornamado, kaj geometrie proporciita greka arkitekturo estas simile bazita.

Lordo Kelvin foje rimarkigis: „La scienco tutege devigas nin konfesi kaj kredi al Direktanta Povo — al influo alia ol fizikaj, dinamikaj kaj elektraj fortoj“, kaj ĉefa perilo uzata de tiu Povo estas la universala ritmo. Oni ne estas devigata trostreĉi la imagon supozante kunrilaton inter dancado de elektronoj ĉirkaŭ centro, dancado de antikvaj hindoj rondirantaj, dum ili psalmokantas al prapatraj spiritoj, kaj dancado de anglaj gejunuloj ĉirkaŭ majostango.

Warwick, Queensland. C. C. D.

Kelkaj rezultoj de senalkoholismo en Usono.

Antaŭ nelonge, kiam mi promenis kun amiko, li diris: „Ni iru en tiun ĉi butikon. Mi volas aĉeti ĉokoladokandon.“

Estis tiam strange aŭdi viron tiel paroli. „Ĉu vi estas kandomanĝanto?“ mi demandis.

„Mi ĝas tia“, li diris, „depost la lando sekigis. Mi devas min stimuli tiamaniere.“

Dum ni atendis la ricevon de la kando, li reiris: „Ĉu vi ne scias, ke sukero en la korpo rilatas al alkoholo? En multaj trinkejoj nun tiuj, kiuj vendas trinkejojn nealkoholajn, komencas vendi ankaŭ kandon. Antaŭ kelkaj jaroj, kiam mi vivis en minista urbo, mi rimarkis, ke kelkaj el la viroj estis preskaŭ fanatikaj por kando. Preskaŭ ĉiuj ne trinkis alkoholaĵojn. Mi supozas, ke la kandomanĝo de tiom da viroj kaŭzis la nunan alprezon de sukero. Kando malhelpas la deziron por alkoholaĵoj. Ĝi estas stimulaĵo kaj estas donata al soldatoj por fortigi ilin.“

De tiu tempo mi rimarkis, ke kando estas vendata en multaj lokoj, kie kunvenas la viroj kaj kie ĝi ne estis vendata antaŭe. Nova speco de kando estas nun vendata, almenaŭ nova por mi. Ĝi estas vendata en grandaj pecoj ĉokoladosimilaj po 5 aŭ 6 cendoj. Eĉ je la nuna kosto de sukero la profito estus eksterordinara.

Ili estas melankoliaj ejoj nun, la reformitaj trinkejoj. Nur kelkaj de la antaŭaj ĉeestantoj ilin vizitas. La sceno sugestas ĉampanvinon aŭ bieron senvivan kaj malnovan. La trinkejestroj

danĝero al pli altaj regionoj. Interesa estas ankaŭ statistiko, kiun akvovolumenon po sekundo defluigas niaj plej konataj riveroj. Ĝi atingas ĉe la Misisipi 17500 kubometrojn, ĉe Laplata 20000, Janise-Kian 25000, Kongo 50000, Maranjono 70000, Danubo 8500, Nilo 3700 kaj Rejno eĉ nur 2000 kbm.

La moderna konstruo de la lumturoj.

La amerika Sperry Gyroscope Company konstruis lastatempe lumturojn, kiuj per sia lumo ebligas al ŝipoj kaj aviadiloj la vojtrovadojn je kvaroble pli grandaj distancoj ol ĉe la lumturoj de malnova konstrumaniero. Tiu eksterordinara intenco estas atingata per tio, ke la lumo de la lumjetilego estas elradiata ne horizontale ĉiuflanke sed vertikale alen. La tiamaniere produktata lumkolono kaj antaŭ ĉio la precize konturumata lumigado de altege super la tero estantaj nuboj estas videbla al ŝipistoj kaj aviadistoj ĝis distancoj de 100 kaj pli da marmejloj.

La plej grandaj moneroj.

La plej granda kaj peza monero ĝis nun ĉirkuanta, estas la „Lool“ de la anamanoj en Malantaŭa Hindujo. Ĉi tiu grandega ordisko pezas proksimume unu funton kaj havis antaŭ la milito valoron de 870 ŝilingoj (ĉ. unu miliono da nunaj aŭstraj kronoj). La monero ne estas stampita, sed surskribita per hinda farbo. Aliaj nekutime grandaj moneroj estas japana „Oban“ valoranta ĉ. 220 ŝilingojn kaj la „Benta“ de la aŝantioj egalvalora al la 50-dolarmonero de la kalifornianoj. Al la plej pezaj arĝentaj moneroj arpatenas la anama „Ingot“ valoranta 60 ŝilingojn kun pezo de pli ol unu funto, la ĉina „Tael“ kaj la aŭstra „Doppeltaler“.

aspektas kiel personoj, kies propraj pozicioj ne plu ekzistas. Ili estas sen kuraĝo. „Ne estas same“, mi aŭdis unu el ili diri, „neniam estos same.“

Mi miras, ĉu tiuj ĉi vortoj estas profetaj. Ekzistas kompreneble multaj amikoj de l' alkoholo, kiuj kredas, ke ĝi ne jam mortis kaj ke ĝi ree vivos en sia antaŭa gloro. Ekzistas tamen signoj, ke multaj el ĝiaj amikoj ĝin forlasis tute. Surprizas trovi, kiam ofte oni aŭdas personojn diri, ke multe plaĉas al ili, ke la alkoholo ne plu ekzistas, kaj ke ili esperas, ke ĝi vere mortis. „Mi drinkis tre multe; sed mi ne sentas ian mankon.“ Multfoje oni aŭdas tiajn diradojn, kiuj sugestas, ke en siaj koroj kelkaj el niaj plej eminentaj kaj atestimataj batalantoj kontraŭ la alkoholo sekrete malrespektis sian entreprenon, sentante, ke ili pagis tro kare por la batalo.

Estas pli da indigno inter la virinaj trinkuloj. Pieparte la viroj akceptas la situacion filozofe. Ili komprenas la bonajn rezultojn, kiuj okazos al ili mem kaj aliaj. Sed la trinkulinoj, precipe tiuj, kiuj neniam irinkis tro kaj rigardis la trinkon de alkoholo kiel unu el la plej logaj kutimoj, kiujn ili asociis kun siaj ideoj de feliĉa tempo, ripete esprimas kolere tiajn rimarkojn kiel: „Dio, kion mi ne farus por trinko!“ La vortoj estas por impresi la aŭdanton kaj montras la deziron ŝajni lerta kaj ĉionkomprenata.

La diferenco de pozo inter trinkantaj viroj kaj virinoj malkaŝas pli da humoro flanke de la viroj. Ekzistas vere viroj, kiuj tre ekscitiĝas, kiam ajn oni parolas pri la senalkoholisma leĝo, por ilia parolmaniero oni kredus, ke ĝi estas unu el la plej malnoblaĵoj leĝoj homaj. Tiuj ĉi viroj parolas kviete pri subjekto kiel milito kaj ĝia devigo mortigi unu la alian. Sed senalkoholismo!! Estas...! Oni ne povas presi la vortojn.

Tamen tiuj ĉi homoj estas raraj. La plimulto da trinkuloj, diskutante pri senalkoholismo, parolas bonhumore. Kaj ili humore parolas pri la ebleco akiri alkoholaĵojn spite la leĝon. Kelkaj el tiuj ĉi trinkuloj tamen ne estas humoraj. Ili estas venenaj.

Ekzemple en restoracio, kie mi okaze estis, iu trinkulo, kiu similis al akvo, estis libere kaj senkaŝeme disdonata en malgrandaj blankaj taso, kiam ajn oni ĝin petis; ĝi estis vera veneno, kaj tre simila al trinkulo, kiun multe drinkis la hawaii-anoj en Honolulu kaj kiu rapide kaj plene peregis ilin.

En tiu ĉi manĝejo mi aŭskultis konversacion inter virino kaj viro. La viro diris, ke spite ĉion li opinias, ke la „seka“ leĝo estas bona.

La vortoj incitis la virinon. Ŝi diris: „Nu, se vi opinias, ke trinki estas memorale, kial vi ne opinias, ke fumi estas ankaŭ memorale? Kial vi ne estas logika?“

La logiko de ŝia rimarko estis tipe virina. Ŝi volis ridindigi la viron.

Li respondis: „Mi ne akordiĝas.“ Tiam la virino pli incitis: „Mi ne povas kompreni, kial estas pli memorale trinki ol fumi la grandan nigran cigaron, kiun vi fumas.“

Li ridetis bonhumore kaj ne respondis. Por lin puni, la virino parolis afable al la aliaj ĉe la manĝotablo.

La plej malfacila parto de la ŝanĝo jam pasis. Sendube ĝi estas malfacilaĵo por milionoj da homoj en Usono. Sed sendube, se la popolo voĉdonus nun por la daŭrigo de senalkoholismo, la decido estus tre favora por seka Usono. Jes, Lia Reĝa Moŝto Alkoholo vere mortis.

Friskano.

Letero el Angermanlando.

Multaj turistoj el diversaj landoj interkonsentas, ke Angermanlando estas la plej bela regiono de Svedujo. Belega ĝi estas tial, ke ĝi posedas admirindan naturon: ornamas ĝin multe da montoj,

*) Elp.: Ongermandlo.

La plej alte situantaj hoteloj en Svislando.

La alta situo de la svisaj hoteloj laŭ statistiko starigita antaŭ la milito estas jena: la malplej altaj hoteloj situantaj inter 200 kaj 500 metroj sumigas je 626; 394 situas inter 501—800 m., 188 inter 801—1000 m., 198 inter 1001—1200 m., 126 inter 1200—1400 m., 145 inter 1400—1600 m., 90 inter 1600—1800 m., 122 inter 1800—2000 m., 34 situas pli alte ol 2000 m., unu pli alte ol 3000 m.

Humor-Angulo.

Modelo por mallonga saluto.

En kunveno de la Esp. grupo Graz (Stirio, Aŭstrio) sprita ano, s-o Wallner, salutis la samideanojn per jenaj paroloj:

Tre estimataj gesinjoroj! Pardonu, ke mi kuraĝas peti vin, bonvole permesi al mi, ke mi prenu al mi la liberecon plej ĝentile demandi vin, ĉu vi havas la komplezon ne malpermesi al mi petegi vin, havigi al mi la feliĉon proksimiĝi al vi por diri al vi plej afable, ke mi nenion pli sopiras ol esti kapabla montri al vi, kiom mi ĝojas, ke la sorto estis tiom favora al mi venigi la momenton, kiu havigas al mi la plezuron certigi vin, ke estas al mi eĉ neeble per nuraj paroloj esprimi la sentojn, kiuj kaptas mian koron je la penso, ke vi estas konvinkita, kiom profunde mi ĝin sentas kaj kia preferiĝo estas, ke mi havas la honoron saluti vin!

Infana logiko.

La malgranda Emi: „Onklino, vi ja portas tiajn grizajn robojn!“ — Onklino: „Jes, mia infano, mi havas duonfunebro.“ — Emi: Ĉu ĉi vi iu estas duonmortinta?“ Marg. Iv. Kr-off.

montetoj kaj lagoj. Angermanlando ankaŭ estas malmulte tuŝita de la moderna kulturo. Fama sveda parlamentano diris, ke la provinco Angermanlando estas la „orminejo“ de Svedujo; ĉar el Angermanlando oni eksportas multvalorajn lignaĵojn al Anglujo, Nederlando, Francujo ktp.

La provincon trafluas granda rivero, kiu enfluas la maron apud la urbo Störnösund. Angermanlando posedas tri urbojn: la jam nomitan Störnösund, Örnköldsvik kaj Sollefteå. Störnösund estas la plej granda, ĉar ĝi havas dekmil loĝantojn; ĝi ankaŭ estas la ĉefurbo de la provinco. Örnköldsvik venas en dua vico, ĉar ĝi havas ĉ. kvinmil loĝantojn; tamen ĝi estas tute speciale „nia“ urbo, ĉar ĝi estas la ĉefurbo de la Esperantistoj en Angermanlando. Nia movado tie havas multajn kunbatalantojn, kiuj laboras diligente por nia celo. Sollefteå estas la plej malgranda urbo, sed la plej bela. Ĝi havas nur 3279 loĝantojn. La urbo posedas ĉarman parkon kun belaj elrigard-punktoj. Du hoteloj, konataj pro bonaj manĝaĵoj kaj kompleksaj servistoj, zorgas por la komforto de fremdaj vizitantoj kaj turistoj. Tial mi konsilas al eksterlandaj ĝesamideanoj, kiuj deziras viziti la plej belan regionon de Svedujo, veni al Sollefteå kaj resti ĉi tie por kelka tempo.

La Esperanta movado nun kreskas en Angermanlando precipe inter la laboristaro, kaj vizito de fremdlandaj samideanoj certe ankoraŭ plivigliĝus la intereson por nia ideo.

Frans Qvist.

Muziko.

Ĉu la muziko estas internacia?

Tre ofte en paroladoj, kaj artikoloj oni trovas la certigon, ke la muziko estas internacia arto, kaj la rajtigita demando aperas: Ĉu tio estas prava? La verkisto ofte opinias la ĝustan, sed li esprimas ĝin malkorekte, kaj per tio li kaŭzas idean konfuzon ĉe la leganto, kiu tie, kie la verkistopinionas la muzikon kiel komprenilon, pensas la karakteron de la muziko.

Esperanto estas internacia lingvo; tamen poemo, ankaŭ Esperante verkita, povas esti tute nacia. Tiu fakto, transportata al la muziko, tuj montras al ni, kiel la vorto „internacia“ devas esti komprenata.

Berthold Auerbach iam diris: „Muziko sola estas la mondlingvo kaj ne devas esti tradukata. Tie parolas animo al animo.“ Ankaŭ se tiu frazo hodiaŭ, kiam ni havas internacian lingvon, ne plu valoras en sia plena esenco, tamen ĝi ne perdis sian signifon. Ĉar fakte la muziko kun la pentrarto kaj la skulptado estis la sola teritorio por longa tempo, sur kiu la popoloj malsame parolantaj interkomprenis unu la alian senpere, ne bezonante la lingvon.

Sed estas malkorekte certigi, ke muziko estas internacia arto kontraŭa al la poezio, kiu havas pure nacian karakteron. Muziko estas nacia, ĝi estis kaj estos ĉiam nacia, tiel longe, kiam ĝi estos ero de la animo de ĝia kreinto, tiel longe, kiam en ĝi sin reflektos la esenco kaj la karaktero de ĝia kreinto. Kaj la homo estas infano de sia hejmlando, kiu surprenas al li sian stampon kaj engravuras rememorojn en lian koron.

La sekvanta vorto de Liszt trafas pli bone la ĝuston: „La muziko estas signebila kiel la universala lingvo de la homaro, per kiu la homo sentado povas sciigi sin al ĉiuj koroj en same komprenebla maniero; krom tio ĝi prezentas la plej multoblajn dialektojn al la diversaj nacioj, kiel ili estas pli konformaj al la spirito de unu aŭ de alia.“

La muziko tial devas esti komprenata kiel ligilo inter popolo kaj popolo, kiu — portante de ĝia nacia propreco — ĝin volas kaj povas kompreni al alia nacio. Tiel la muziko konigas al ni la belon de fremdaj nacioj, sed la belon de nia propra plej profunde.

K. Haefeker.

Valuto.

Du amikoj en nordrejnlanda urbo renkontis unu la alian en la strato.

„Amiko!“ ekkris la unu, kiu estis senrimeda artisto. „Kia feliĉo! Hier aŭ vespere alflugis al mi bela, parolanta pagago!“

„Sed kial vi ĝojas pri tio?“ diris la alia. „Vi ja havas mem apenaŭ iom por mordeti, kaj nun vi devas ankaŭ nutri la papagon!“

„Estas malgrave“, respondis la artisto, „atendu nur! La papagon mi anoncos en ĵurnalo, la posedanto venos kaj pagos bonan rekompencan al mi; sed tiam mi aĉetos manĝaĵojn, belegan domon kun granda ĝardeno kaj —“

„Finu!“ interrompis lin la amiko. „Ĉu vi estas freneza?“

„Ne, ne; absolute ne!“ ridis la feliĉulo. „La papago ja parolas holande!“

El letero al la ĉefredaktoro de ET. (Vera okazintaĵo.)

... ĉe via respondo bonvolu sur la koverto ne nur unu marko de 6 mk. glui, sed unu de 1.60, unu de 1.50, unu de 1.20, du de 0.75 (diversajn kolorojn), unu de 0.15 kaj unu de 0.05... Sankta seriozeco!

Rimspritaĵoj.

La kaprino.

Se iu vin boksas en kapra malico, Boksu lin ankaŭ en mala kaprico!

La surprizo.

Pikis ŝin — ne estis plaĉo —

En la vangon bestetaĉo.

Kapti ŝi la kulon penas;

Sed en man' ŝi pulcn tenas.

G. Ajul.

*) Bobelo (Vortaro de Rhodea), a. bubble, fr. bulle d'air. Vorto „rotaciaĵo“ signifas angle „vortex“. Laŭ vortaro de Bolrac „voritico“ kaj „voritko“ ne taŭgas.

Diversaĵoj.

Krimo rezultas el eksceso de energio.

Tre interesa estas esplorado farita antaŭ la tempo de la urba reformuloj en Liverpool. Ili venis al la konkludo, ke la krimoj efektiviĝitaj de la urba junularo estas rezulto el lia eksceso de energio. Estis elskizitaj tre zorge urbokartoj, kiuj montris la domojn kaj distriktojn, en kiuj ofte okazis junulara krimo. Post zorgoplena esplorado oni trovis, ke la ofteco de la krimo dependis ne de la socia kondiĉo aŭ l' enloĝantaro nek de la enspezoj de l' gepatroj de la junaj krimuloj, sed preskaŭ sole de la proksimeco aŭ male de la domoj al publika parko aŭ ludogrundo. Ne gravis, kiel malgranda aŭ aĉa estis la domo; se ĝi nur estis proksime de publika parko, junulara krimo tuj malaperis. Kie la atingo de publika parko estis tre malfacila aŭ nebla por la infanoj, junulara krimo tuj atingis sian maksimumon.

J. D. A.

Superakviĝoj.

La superakviĝo de l' Orinoko, unu el la plej gigantaj sudamerikaj riveroj, prezentas potencon naturspektaklon. Ĝia larĝo, ordinare 3 kilometroj, en tempo de superakviĝo etendiĝas ĝis 10 kilometroj. Dum tiu alta nivelo la volumeno de la defluanta akvo atingas 25000 kubometrojn po sekundo. La plej granda profundo estas ĉ. 100 metroj. Dum la superakviĝo de l' giganta Maranjono (Amazona rivero) la akvo altiĝas je 20 metroj super la ordinara nivelo. Tiuj superakviĝoj, kvankam polencegaj, tamen malutilas malpli ol tiuj de eŭropaj riveroj kaj torrentoj, ĉar la amerikaj riveroj fluas tra maldense loĝataj regionoj, kaj la tiea loĝantaro konas la ĉiujare je certa tempo okazantajn superakviĝojn kaj povas sin ŝirmi kontraŭ ili. Ankaŭ la faŭno retiriĝas antaŭ la